

Heinrich Dippel,
La koro ĉe l' Rejno

tradukita de N. N. 16

En Rejno profunda kaŝiĝas kron'
Sorĉita el or' kaj juvela ŝton',
Kaj kiu ĝin levos kun brava kor'-
Li estos kronata en sama la hor'.
De l' Belt' ĝis Danubo en land' kiu ajn
Reganto li estos: la Reĝo de l' Rejn'!

En Rejno profunda kaŝiĝas lir'
El blanka eburo kaj brilsafir'
Kaj kiu ĝin levos kun brava kor' -
Tuj verve li kantos kun fajra fervor'.
Senmorta li estas en temp' kiu ajn:
La Bardo estonta, la Bardo de l' Rejn'!

Ĉe Rejno post verdaj vinbranĉoj jen
Dometo sin kaŝas kun gajmien'.²
Enloĝas knabino kun virga kor',
Je virto ja riĉa, malriĉa je or'.
Se virgan ĉi koron akirus mi,
Mi donus la kronon, la liron por ĝi!

...

²aŭ eble pli bone:

Mi konas dometon en verda ĝarden'
Kaŝitan malantaŭ vit-branĉoj jen.

*Traduko de la Germana poemo "Das Herz am Rhein" de HEINRICH DIPPEL (*1825 – †1870) en Esperanton de N. N. 16 en 1932-08-01.*

Arg-496-969 (2009-12-02 13:19:24)

El: Heroldo de Esperanto, Köln, Germanio. Speciala numero, 13-a jarkolekto, 1-an de aŭgusto 1932. Redaktoroj: Teo Jung/Joseph Ferdinand Berger.

Vidu ankaŭ la retejon <http://www.literaturo.dk/rejno.htm>, kiun verkis s-ro Lars Kromann, Stenbrydervej 6, Værløse, DK-4640 Fakse, Danujo.

Mi, Manfred Retzlaff, proponas alian traduk-version de la unuaj du linioj de la tria strofo; ĉar mi pensas, ke la vortoj "kun gajmien" ne bone konvenas al dometo. Mi aldonas mian ŝanĝo-proponon en piednoto.